nia voĉo

madrida esperanto-liceo marto 2023

## EKSPOZICIO KAJ PRELEGO EN FUENLABRADO

Dum la tuta monato marto prezentiĝos en Fuenlabrado ekspozicio pri Esperanto. La loko estas la centro de edukado de plenkreskuloj CEPA Paulo Freire (strato Creta 2)

Ĝi estis inaŭgurita la 2an de marto per prelego titolita "Esperanto, eko-lingvismo", fare de Juan del Castillo.






## PLU DAŬRAS LA KONKURSO DE DEBATO EN FUENLABRADO

Komenciĝis la konkurso pri debato en la municipoj de la suda zono de la madrida regiono, pri kiu ni informis en pasintaj numeroj, kaj en la kazo de Fuenlabrado temos pri la rolo de Esperanto en la Eŭropa Unio. Pri ĝi informis la lokaj amaskomunikiloj, kiel ekzemple: https://ondafuenlabrada.es/48-estudiantes-de-secundaria-participan-en-la-i-liga-de-debate-de-fuenlabrada/ kaj https://www.fuenlabradanoticias.com/articulo/fuenlabrada/i-liga-debate-escolar-llega-fuenlabrada/20230209205230162849.html.



## ARTIKOLO PRI JUNULARA VOLONTULADO PER ESPERANTO

Nia samideano, prezidanto de la junulara sekcio de la Federacio, Manu Guaroa, publikigis artikolon pri sia sperto pri volontulado pere de Esperanto, en la retejo europajoven.org, de la servo por junularo de la urbestraro de Madrido. La titolo estas: "Esperanto, una lengua llena de oportunidades: mi experiencia de voluntariado en Rotterdam". Jen la ligilo: https://www.europajoven.org/experiencia/esperanto-una-lengua-llena-de-oportunidades-mi-experiencia-de-voluntariado-en-rotterdam/.

Ĝi aperis ankaŭ en versio en la angla lingvo en la eŭropa porjunulara portalo de la Eŭropa Unio, ĉe la adreso: https://youth.europa.eu/stories/esperanto-language-full-of-opportunities-my-experience-of-volunteering-rotterdam_es.

## VIZITO AL LA MUZEO

Kiel anoncite, la 23an de februaro grupo de esperantistoj kaj amikoj vizitis la Muzeon pri Astronomio kaj Geodezio en la Fakultato pri Matematiko de la Universitato Complutense. Entute ĉeestis 14 homoj. Ni esperas organizi novajn kulturajn agadojn, pri kiuj ni informos per la kutimaj kanaloj.





## KUNVENOJ KAJ RENKONTOJ

Ni rekomencis la renkontiĝojn en la sidejo, ĉiujn lundojn ekde la 18,30 horo.

Kiel anoncite, la duan lundon de ĉiu monato ni intencas organizi prelegojn, debatojn aŭ komunajn legadojn kaj diskutadojn, kaj la kvaran lundon ni organizas legatajn teatraĵojn, kun partopreno libera de ĉiu ĉeestanto, por koni esperantan literaturon kaj praktiki paroladon kaj deklamadon. Por komenci la aktivadon, lastan lundon ĉeestantoj en la sidejo voĉlegis fragmenton el Hamleto, kaj poste oni komentis aspektojn lingvajn kaj enhavajn.

Krome, ni daŭrigas la unuasabatajn rendevuojn en la strato Esperanto de Madrido. En marto ni kunvenos la 4an, ankaŭ je la 18,30 horo en la sama loko, la polpejo Pulpería O Miño, ĉe la numero 2 (metrostacio Alsacia, lineo 2). Ni atendas la alvenon de amiko el Zaragozo kaj eble el aliaj lokoj, krom la madridanoj mem.

Memoru ke ĉiuj estas bonvenaj al la renkontiĝoj, lundaj kaj sabataj, sendepende de la nivelo de la lingvokono.

## PLIAJ INFORMOJ

Por aliaj novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo Tŭitero (*Twitter*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.


madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com